

Orgaan
van de Bond van
Arbeiders-
Esperantisten FLE

Laborista Esperantisto

In het gebied van de Nederlandse taal

Redactie en Secretariaat van de Bond van Arbeiders-Esperantisten: Npveustraat 33 II, Amsterdam-17, telefoon (020) 82177
Penningmeester F.L.E., Wingerdweg 53, Amsterdam-19, postgiro 331133 - Boekendienst F.L.E., Marnixstraat 57, Haarlem, postgiro 111278

Bilancio de unujara agado en GDR

Dumil personoj lernas Esperanton aŭ estas jam organizitaj

La 31an de marto 1965 fondiĝis la Centra Laborrondo de Esperanto-amikoj en Germana Kulturligo.

Per tio la multjaraj klopodoj pri oficiala organiziĝo de la movado en GDR rikoltis finan sukceson. Intertempe pasis unu jaro, kaj taŭgas nun rerigardi, kiom estas jam atingita sub la novaj cirkonstancoj. Ulrich Lins veturis al GDR kaj jen skizas siajn impresojn.

Post la longa paŭzo, kiun postulis la Tria Regno, ankaŭ en la soveta zono, same kiel en ĉiuj aliaj zonoj de Germanio, mirinde rapide reekfloris la agado por Esperanto. Grupoj elkreskis la teron kvazaŭ fungoj, kursoj estis amase frekventataj... sed tiun bonaŭguran rekomencigon abrupte ĉesigis dekreto, laŭ kiu komence de 1949 ĉiuj grupoj estis dissolvendaj. Kiel en aliaj orientaj landoj la esperantistoj estis devigitaj tute rezigni ĉian varbadon, gazetoj ne plu raportis, kaj nur restis la limigitaj eblecoj en privata kadro varti la lingvoscion. La saksa Ministerio pri Popolklerigo en januaro 1949 motivigis la anatemon per la kutimaj argumentoj, nome ke Esperanto kiel nenatura lingvo ne kapablas servi la interpopolan komprenigon, aldonante ke la literaturon konsistigas „reakciaj tendencoj” kaj ke la esperantistoj preferu dediĉu siajn fortojn al plenumado de la Dujara Plano kaj al studado de „vera mondlingvo”, antaŭ ĉio de la rusa, kompreneble.

Dum la jaroj 1955/56 tamen pliboniĝis la situacio, la limigoj ne plu estis tiel severaj, kaj la Packonsilantaro eĉ oficiale uzis Esperanton aŭ sendis delegaciojn al la UK en Varsovio kaj Sofio. Artikolo en la gazeto „Junge Welt” fine de 1959, kiu ripetis la asertojn pri ne-taŭgeco de la Internacia Lingvo, provokis tian lavangon da protestoj, ke la redakcio devis en cirkulero al la reagintaj legantoj iom mildigi sian negativan juĝon.

Lernolibroj el la kelo

Kvankam do laŭ tiaj antaŭsignoj baldaŭna permeso de organizita agado estis atendebla, la decido de Germana Kulturligo

en pasintjara februaro, krei sekcion por esperantistoj, venis iom subite kaj certe surprizis — tamen agrable — eĉ multajn amikojn de Esperanto en GDR mem, tiom pli ĉar oni ĝenerale ne klare sciis, ĉu aŭ kiam estis nuligita la dekreto de 1949. La menciita Centra Laborrondo, prezidata de Rudi Graetz, ekspozicia direktoro en la Ministerio pri Komerco, estas kolektivo de entute dek-unu personoj, kies tasko estas kunordigi la agadon por Esperanto en GDR; ĝin subtenas distriktaj laborrondoj, kiuj siaflanke fondas en la urboj laborgrupojn. Dresden, Leipzig, Karl-Marx-Stadt kaj Orienta Berlino estis la unuaj, kie fondiĝis tiaj distriktaj laborrondoj; ilin sekvis Magdeburg, Rostock, Halle kaj Schwerin.


Momente en tuta GDR okazas naŭdek kursoj kun entute ĉ. mil partoprenantoj. Jen sendube ĝojiga fakto, kiel ankaŭ la multa interesiĝo reganta inter gejunuloj permesas esperi, ke baldaŭ malaperos la nun ankoraŭ ekzistanta troaĝeco de la esperantistaro. Krome, ke post unu jaro jam mil personoj estas organizitaj, povas esti konsiderata kiel solida fundamento. La ĉefa problemoj en la komenco estis la manko de lernolibroj kaj vortaroj, sed jen prezentigis vere mirakla bonŝanco: La vidvino de F. Hegewald kaŝis 2500 ekzemplerojn de lernolibro, kiun en 1926 ŝia edzo estis eldoninta en Hannover, dum pli ol du jardekoj; ŝi tuj, kiam la movado restariĝis, prenis la stokon el sia kelo kaj donacis ĝin al la instruavidaj grupoj. Sed ne necesas emfazi, ke tio estas nur dumtempa solvo; komence de 1967 aperos nova lernolibro, kaj ĝis tiam plian helpon donas 15paĝa gramatika enkonduko kun vortareto, jam dufoje enpresita en la revuo „Der Esperantist”, kiu aperas en 2500 ekzempleroj sesfoje jare en duona formato de GER. (GER estas Germana Esperanto-Revuo, kiu revuo estas iom malpli granda ol LE. Red.) Vortaro Esperantogermana aperos en la konata lingvoeldonejo „Enzyklopädie”, Leipzig, kaj estas nun verkata de juna sinologo momente troviganta en Indonezio, kiu debutis sur tiu kampo kiel kunlaboranto en vortaro ĉina-germana.

Foira Renkontiĝo en Leipzig

Laŭ sia kvinpunkta principaro la Centra Laborrondo, kiu volas daŭrigi la tradicion de la antaŭmilita Laborista Esperanto-Asocio, i.a. konsideras sia tasko informi alilandajn esperantistojn pri la politiko de GDR. Al tio intencis servi la Foira Esperanto-Renkontiĝo la 12an de marto 1966, kiu estis oficiala programejo de la Foiro de Leipzig; kaj supozeble tia estos ankaŭ dum la estontaj foiroj, do en printempo kaj aŭtuno ĉiujaraj. Dum en pasinta printempo, ankoraŭ kelkajn semajnojn antaŭ la fondiĝo de la Centra Laborrondo, renkontiĝo de esperantistoj dum la Foiro estis malpermesita, ĉi-foje eĉ la loka radio esperantlingve ĝin propagandis. Kredeble pro la nesufiĉa informado al la esperanta gazetaro tamen nur malmultaj eksterlandanoj trovis la vojon al la salono en la zoologia gastejo: Fakte krom du el FRG ĉeestis nur po unu jugoslavo, polo kaj hispano kaj kelkaj hungaroj kaj svedoj — kontraste al preskaŭ 150 esperantistoj venintaj el ĉiuj partoj de GDR. La programo konsistis el prelego pri la signifo de la Foiro, el salutparoladoj de kelkaj eksterlandanoj, inter kiuj Edmund Fethke (Varsovio) tuŝis german-polajn rilatojn, kaj el konciza prezento de la eduka sistemo en GDR kaj de la nuna stato de la Esperantomovado. Sed por mi estis aparte interese, povi konatigi kun la agema sekretario de la Centra Laborrondo, Eugen Menger, kaj aliaj gvidantoj, kiuj malgraŭ sia fiero pri la sukcesoj atingitaj dum nur mallonga tempo ne kaŝis sian konscion pri la ankoraŭ venkendaj problemoj — jen ĉefe manko de instruistoj (unu trofervorulo postulis post la evento de la 31-3-1965, ke la registaro tuj enkonduku la lingvon en ĉiujn lernejojn), sed ili ŝajnas tute sobre kaj seniluzie pesi la eblecojn realajn kaj ne jam eluziblajn.

Heine en Esperanto?

El la nuntempe kovataj projektoj mi menciis nur kelkajn: Unu membro de la Centra Laborrondo, D-ro Rechtziegler, kompilas katalogon de la trimil-voluma Es-



La honorigito, sidante la tria persono de dekstre.

Esperanto venkos!

Ĉiam antaŭen al nia idealo. Jen la devizo de k-do Dreesman, kiun la Asocia estraro igis honora membro de FLE, la 14an de junio pasinta, pro „pli ol 50 jaroj fidela al Esperanto kaj FLE.”

peranto-libraro en la Germana ŝtata Biblioteko en Berlino, kiu estos baldaŭ je dispono ankaŭ de eksterlandanoj. Ĝin sekvas katalogoj de aliaj publikaj bibliotekoj; mi mem havis okazon vidi, ke la Dimitrov-Muzeo en Leipzig posedas sescent-voluman kolekton. Lige kun tio estas notinde, ke oni planas fondi Akademian Rondon en Berlino, kiu espereble ricevos certan influkapablon per la partopreno de Prof. Falkenhahn lekcianta pri slavaj lingvoj en Humboldt-Universitato, kiu eklernis la lingvon antaŭ nur unu jaro, sed jam nun — kiel li demonstris dum la Foirna Renkontiĝo — flue ĝin regas, kio ĝenerale nek ĉe profesoroj nek ĉe pli simplaj esperantistoj estas tuj konstatebla. Aprezon cetere meritas la plano eldoni — krom estonte aliaj literaturaj (ekz. de Brecht) — tradukon de la verkaro de Heine, pri kio jam okazis intertraktadoj kun Kalocsay.

Niaj filatelistoj antaŭĝoju pro poŝtmarko eventuale eldonota en 1967 okaze de la 80 jara jubileo de Esperanto, dum teatroamantoj okaze provu spekti la komedion „Frau Flinz” de Helmut Baierl, en prezento de Berliner Ensemble, en kiu rolas iu strangulo nomata „Esperanto-Lohse” (Willi Schwabe), aperante kun grandega verda stelo surbruste kaj parolante iun certan, por nemembroj de nia esotera movado nekompreneblan lingvon.

Resume, la bilanco post unujara agado estas sufiĉe kontentiga kaj pravigas optimismon. Delegacio de almenaŭ ducent esperantistoj el GDR intencas partopreni en la 51a UK en Budapeŝto kaj tie havos — plej-parte unuafoje — okazon senĝene interbabilii kun multaj diversnaciaj. Ja eĉ al plej vigla landa movado mankas pipro kaj salo, se ne ofte ĝiaj adeptoj povas libere kontakti la internacian movadon trans ĉiujn limojn.

Ulrich Lins

(El Germana Esperanto Revuo.)

Bibliografio de germana literaturo en Esperanto

Germana Esperanto-Asocio intencas kompili bibliografion de germana literaturo tradukita en Esperanton. Estas sciata, ke la libroforme elirantaj eldonaĵoj ĝis 1929 estas listigitaj en la impona Bibliografio de Stojan. Por la tempo 1929-45 tamen mankas bibliografiaj indikoj. (La post-militajn eldonaĵojn libroformajn registras CED.)

Sed neniam estis notitaj la diversaj literaturaj, kiuj aperis tra la jardekoj dise en la Esperanta gazetaro. Guste tiujn poemojn, novelojn, romanfragmentojn kaj aliajn literaturajojn celas listigi nia kompilota bibliografio. Pro manko de materialo ni turnas nin al vi, petante vian aktivan helpon por alsendo de la koncernaj malnovaj gazetoj. Ni estas konvinkitaj, ke multaj malnovaj esperantistoj ankoraŭ posedas malnovajn jarkolektojn de Esperanto-gazetoj aŭ almenaŭ unuopajn numerojn, kiujn ili volonte cedas por tiu

La vivnivelo de la hungaraj laboruloj

(Daŭrigo de la ĉefartikolo, aperinta en la junia numero de LE.)

Sanitaraj kaj naskiĝokvantaĵaj rilatoj

Ties mezuro estas la meznombra aĝo, la proporcio de la infanmortado, la nombroj de hospitalaj litoj kaj kuracistoj. Ni komencu per tio, ke en Hungarujo etendiĝis la senpaga, sociala asekurado al 97% de la tutloĝantaro; la asekuritoj kaj ties gefamilianoj ricevas senpagan kuracistan kaj hospitalan prizorgadon, kaj la medikamentojn — se la kuracado okazas ne en hospitalo — ili ricevas kontraŭ minimuma (15 procenta) pago. Grava faktoro de la pliboniĝo de la sanitara situacio estas la preskaŭ ĝenerala sociala asekurado, al kiu aludas jenaj faktoj: la proporcio de la loĝantaro pli aĝa ol 60 jaroj altiĝis dum la pasintaj du jardekoj de 10,7% al 14,5% kaj la meznombra vivdaŭro — atendebla ĉe naskiĝo — altiĝis pli ol jardekon: ĉe viroj ĝis 65,2 jaroj, ĉe virinoj ĝis 69,6 jaroj. La infanmortado rilate al 1000 vivnaskitoj de la meznombro 92,5 en jaroj 1948-49, malpliĝis al 44,1, dum la nombro de la kuracistoj por 10.000 loĝantoj altiĝis de 11 al 17 kaj tiu de la hospitalaj litoj de 52 al 74,4 altiĝis.

Instruado, fakinstruado

La degiva instruado daŭras 10 jarojn, la ĝeneralan lernejon finas 98-99% de la lerndevigitoj kaj 1/3 de la 14-18 jaruloj finas mezlernejojn. La nombro de la universitatoj kaj ĉeflernejoj por 1.000 loĝantoj altiĝis de la antaŭmilita 1,1 al 8,2 kaj la universitatojn fininta intelektularo preskaŭ duobligis, rilate al la 1941 jara. La instruado en la ĝeneralaj — kaj mezlernejoj estas senpaga, dum la 90% de la universitatanoj kaj ĉeflernejoj ricevas ŝtatan stipendion.

La fakinstruado estas same trinivela: la baza fakinstruado okazas en industriaj lernejoj kaj fakmezlernejoj, la mezgrada okazas en teknikaj lernejoj kaj la plej supera fakinstruado okazas en la teknikaj universitatoj kaj ĉeflernejoj. En la ŝtata industrio laborantaj gelaboristoj havas en 80% fakinstruitecojn.

Okupigeco

La okupigeco estas altnivela. La tutnombro de la loĝantaro estas iom pli ol 10,1 milionoj kaj la nombro de la labor-

celo. Ĉefe ni bezonas jenajn gazetojn: „La Revuo” (Paris, 1906-14), „Esperanto Triumfonta” (1920-25), „Heroldo de Esperanto” (ĝis 1926), „La Bela Mondo” (Dresden, 1908-1909), „Universo” (Dresden, 1909-12), „La Duonmonata” (Leipzig, 1909-10), „Literatura Mondo” (Budapest, tri periodoj), „Tra la literaturo” (Dresden, 1923), „Literatura Informilo” (Leipzig, Hirt-Verlag, 1924...), „Germana Esperantisto” (Berlin, 1905-36), „Germana Esperanto-Gazeto” (Magdeburg, 1908-12), „Rund um die Welt” (Wolfenbüttel, 1909-14), „Esperanto-Praktiko” (Berlin, 1918 ĝis fino). Fidante je via valora helpo ni jam nun kore dankas pro la sendota materialo. Pri la rezultoj de niaj laboroj ni poste raportos.

Oni skribu kaj sendu materialon al la kompilanto de la bibliografio: S-ro Reinhard Hauptenthal, 6603 Sulzbach/Saar 1, Am Bahndamm 12, Germanio.

ensendis:

Germana Esperanto-Asocio/
Germ. Esp. Junularo

kapabluloj inter 15-60 jaroj estas 6 milionoj. La pensia aĝlimo estas ĉe virinoj 55 jaroj, same por tiuj laboristoj, kiuj laboras en laborsfero por sano malutila (ekzemple ministoj) kaj ĉe la viroj 60 jaroj. (En jaro 1963 okupiĝis 4.228.000 homoj en diversaj branĉoj de la hungara mastrumado kaj la nombro de la pensiuloj altiĝis super 1 miliono.). Ne nur la laboristoj kaj salajruloj, sed ĉiuj asekuritoj — same la kooperativaj kamparanoj — estas rajtigitaj al pensio. Se ni konsideras, ke plimulto de la laborkapabla junularo — preskaŭ 600.000 personoj — lernas en mez- kaj superagradaj lernejoj, ni apenaŭ devas pruvi, ke en Hungarujo la okupigado estas preskaŭ 100 procenta kaj ke pliiĝas la demando de la laborforto. La tutnombro de la perlaboruloj estas 5,3 milionoj kaj en unu familio meznombro estas 1,8 personoj, kiuj perlaboras.

Refreŝiĝo kaj amuzado

La sindikatoj, industriaj entreprenoj kaj diversaj institucioj pojare refreŝigas kvazaŭ duonmilionon da plenkreskuloj kaj infanoj favore. La eblecojn de la amuzado kaj klerigado signas: la nombro de la teatroj-, operon- kaj koncertojn-vizitantoj estas en unu jaro 6,5 milionoj, la nombro de la kinejojn vizitantoj estas 120-125 milionoj. La rezulto de la ĝenerala kulturnivelo kaj malaltaj prezoj estas: la teatrojn, operajn prezentadojn kaj koncertojn regule vizitadas ĉiu socia tavolo, ankaŭ la fizikaj laboristoj. Ĉio ĉi en Hungarujo estas jam ĉiutaga fenomeno.

La realsalajron por unu persono pliigas kvazaŭ per 20 procentoj la supre malklonge skizitaj vivcirkonstancaj komponantoj: la grandskala kaj esence senpaga publika instruado, sociala asekurado, nasksubvencio, kromsalajro por familiano, por refreŝigaj kaj veturaj favoraĵoj, diversaj sociaj atribuo.

Ne malpli grava estas la — per nombro ne esprimebla — socia kaj ekonomia rolo kaj efiko de la vivcirkonstancoj. Ni ne asertas tion, ke la homoj laborantaj en Hungarujo vivas senzorge, sed por ili estas jam nekonata la problemoj kaj zorgoj de la vivtenado kaj malcertece de la morgaŭo.

Stefano Garamvölgyi

Tradukis: D-ro Bálint Szemenyei, Orosháza

Examentaken

van de Algemene Nederlandse
Esperanto-examen-commissie
op het examen gehouden te Amersfoort
op 28 mei 1966

E 2

Ter vertaling.

Tijd: van 10-12 uur.

Vertaal in het Esperanto:

Aan de Heer Juan Cuenco,
MANILA
PHILIPPINIEN. 1)

Waarde geestverwant,
Uw naam heb ik in ons verenigingsblad gelezen en ik wil graag met u korresponderen. Ik ben drie en twintig jaar en ik woon in Alkmaar, een stad in de provincie Noord-Holland. Maar over twee maanden gaan we naar Amsterdam, de hoofdstad van ons land, wonen. Amsterdam is een grote stad met meer dan achthonderdduizend inwoners. Vooral de binnenstad is heel mooi met zijn grachten en vele huizen uit de 17e eeuw. De omgeving van Amsterdam is niet zo mooi althans minder mooi dan bijvoorbeeld de omgeving van Den Haag. De badplaats Scheveningen trekt 's zomers duizenden bezoekers, en niet alleen Nederlanders maar ook veel buitenlanders. Je kunt er Belgen, Duitsers, Fransen en Engelsen ontmoeten en ook heel veel soldaten die tot de Amerikaanse legers in Duitsland behoren. 2)

Hebt U wel eens andere landen bezocht en hebt U ook internationale Esperanto-kongressen bijgewoond? Ik zou graag naar zo'n kongres willen gaan, bijvoorbeeld 3) in Tokio. Maar Japan is zo ver weg en de reis daarheen is voor mij te kostbaar. U op de Philippijnen woont dicht bij Japan, en U gaat er waarschijnlijk wel naar toe, niet? In de afgelopen winter hebben wij veel geschaatst, wat in een warm land zoals het uwe nooit mogelijk is. Ik ging meestal met een aantal vrienden, soms zelfs met z'n achten en dan reden we twee aan twee. Het was helemaal niet gevaarlijk, want het ijs was dik en sterk en bovendien was het water daar niet diep. Zeker niet meer dan een halve meter. We hadden in elk geval heel veel plezier.

Nu, mijnheer Cuenco, schrijft U spoedig eens een brief terug aan Uw Nederlandse vriend?

Henk.

- 1) = Filipinaj insuloj
- 2) = apartenas
- 3) = ekzemple

E 1

Ter vertaling.

Tijd: van 2-4 uur.

La lasta sonĝo de maljuna kverko.

Sur alte deklivo, tute apude de la libera

marbordo, staris maljuna kverko, kiu havis la aĝon de ĝuste tricent sesdek kvin jaroj. Sed tiu longa tempo por la arbo ne signifis pli ol tia sama nombro da tagoj por ni homoj. Ni maldormas en la tago, dormas en la nokto kaj havas tiam niajn sonĝojn, sed kun arbo estas alia afero, arbo maldormas en la daŭro de tri sezonoj, kaj nur en la komenco de la vintro ĝi endormiĝas, la vintro estas ĝia dormotempo, ĝia nokto post la longa tago, kiu estas nomata printempo, somero kaj aŭtuno.

Dum multe da varmaj someraj tagoj la unutagaj muŝoj dancis ĉirkaŭ ĝia kapo, vivis, flugis kaj sentis sin feliĉaj; kaj kiam la malgranda estaĵo momenton ripozis en silenta felico sur unu el la grandaj freŝaj kverkfolioj, tiam la arbo ordinare diradis: „Vi kompatinda malgranda estaĵo! Nur dum unu momento daŭras via tuta vivo! Kiel malĝoje!”

„Malĝoje?” respondadis ordinare la unutaga muŝo, „kion vi pensas per tio? Ĉio estas ja tiel nekompareble luma kaj klara, tiel varma kaj belega kaj mi estas tiel ĝoja!”

„Sed nur unu tagon, kaj poste ĉio estas finita!”

„Finita?” diris la unutaga muŝo. „Kio estas finita? Ĉu vi ankaŭ finiĝas?”

„Ne, mi vivas multajn milojn da viaj tagoj, kaj mia tago ampleksas tutajn sezonojn. Tio estas io tia longa, ke vi tute ne povus tion kalkuli!”

„Ne, ĉar mi vin ne komprenas! Vi havas milojn da niaj tagoj, sed mi havas milojn da sekundoj, en kiuj povas esti ĝoja kaj feliĉa! Ĉu ĉiuj belegaĵoj de la mondo malaperos kiam vi mortos?”

„Ne”, diris la arbo, „la mondo certe ekzistos plue, senfine pli longe, ol kiel mi povas imagi al mi!”

„Sed en tia okazo ni havas ja egalan daŭron de la vivo, sed ni nur malegale kalkulas.”

El: „Fabeloj de Andersen,” 4a volumo.

E 3

Diktaĵo

1. Vojaĝantoj en dezertoj ofte pereas pro soifo kaj iuj eĉ freneziĝas pro la infera varmeĝo.
2. Ĉe la elirejo de la stacidomo multego da homoj interpuŝiĝis, ĉar ĉiuj urĝis por atingi la atendantajn tramveturilojn.
3. Antaŭhieraŭ mi ricevis poŝtajon ŝarĝitan per punafranko.
4. La ekspedinto ne ĝustatempe informiĝis pri la plialtigita tarifo.
5. Dum inaŭgura soleno ĉiuj ĉeestantoj portas ceremonian veston.
6. La festa vesto de la viroj kutime estas funebre nigra.
7. Oni tamen sciis, ke ĉe la ĉinoj la koloro de la funebro estas blanka.

Antaŭ ne longe mortis sinjorino Matelot, kiu estis 70-jara. Iam estis ŝia nomo tre famkonata kaj ĉiulandaj ĵurnaloj rakontis kun multe da emocio la heroan agon de tiu virino.

En la jaro 1910-a iun nokton la lumtur-gardisto Alexandro Matelot falis de la ŝtuparo en la lumturo kaj svenis. Momenton poste sinjorino Matelot rimarkis, ke la lumo ankoraŭ ne brilas kaj ke la lanternego ne turniĝas. Ŝi volis scii, pro kio. Tuj poste ŝi trovis sur la ŝtuparo sian svenintan edzon. Ŝi portis lin sur lian liton.

Sed rapidege eknoktiĝas kaj ekstere ŝtormas. Kaj ankoraŭ neniu eklumigis la lampon. La virino subite pensas pri katastrofoj, kiuj povus okazi pro la ne-funkciado de la lanterno.

Ŝi supreniras, plenigas la lanternon kaj lumigas ĝin. Sed ĝi devas turniĝi. Pro tio servas iu meĥanismo, kiun ŝi ne povas funkciigi, ĉar la ŝlosilo estas netrovebla. Nun ŝi vekas siajn infanojn, du knabojn, kiuj estas ankoraŭ ne dek-jaraj kaj montras al ili, kiel ili turnu la lanternon. Tio estas fakte tro malfacila laboro por du infanoj, sed devas okazi.

La vento furioze blovas, la ondegoj terure muĝas. Malgraŭ tio la infanoj turnas la aparaton. Dume sinjorino Matelot, kiu malsupreniris, flegis la edzon. Ve, ĉirkaŭ noktomezo la malfeliĉulo mortas. Al li la okulojn ŝi fermas, la manojn ŝi kunigas. Plenuminte tiun taskon, plendolora ŝi denove pene supreniras la krutan ŝtonŝtuparon. Malespera pro ĉagreno, ŝi tamen sufiĉe da forto havas por turni la lanternegon dum la nokto. Ŝi ne volas, ke la morto de ŝia edzo okazigu la morton de aliaj homoj, kiuj tranoktas sur la maro.

M 2

Ter vertaling.

Tijd: van 10-12 uur.

Hoe de prentbriefkaart werd uitgevonden

Wie staat er in onze tijd van opzienbarende uitvindingen nog stil bij de oorsprong van een zo alledaags gebruiksartikel als de prentbriefkaart? Toch zouden zelfs Edison en Marconi er zich niet op kunnen beroemen, dat hun uitvindingen dagelijks in zoveel miljoenen exemplaren over de gehele wereld worden verspreid als die van de boekdrukker Schwarz uit Oldenburg.

De heer Schwarz was een gezellige man. Hij was een trouw lid van een kegelclub en een even trouw bezoeker van de „Bierstube”. Maar toen in 1870 de Franse-Duitse oorlog uitbrak, zag hij verscheidene van zijn jonge vrienden naar de kazernes verdwijnen. Om de conversatie gaande te houden stuurde Schwarz zijn vrienden briefkaarten na. En om die briefkaarten een actueel karakter te geven, drukte hij in de linkerbovenhoek, tegenover de postzegel, een passende illustratie. Een Duits soldaat met een kanon er bij. Dat kon hij gemakkelijk doen, want hij was zelf boekdrukker en in zijn drukkerij had hij nog een oude houtsnede met een kannonier er op.

De Duitse soldaten zongen in die oorlogs-

dagen op de melodie van een Franse gavotte de woorden:

Een kip kan geen druppel water slikken zonder naar de hemel te blikken.

Hij drukte zo'n naar de hemel kijkende kip op briefkaarten en stuurde die naar het front. Het succes was enorm!

Onze Oldenburger boekdrukker had er trouwens niet het flauwste vermoeden van, dat hij een uitvinding had gedaan, die zich over de gehele wereld zou verbreiden. Hij vond alleen het denkbeeld reusachtig grappig.

Naar: „De Verzamelaar”.

S 1

Ter vertaling.

Tijd: 2 uren

(tezamen met mondeling van 2-5 uur)

Neniu popolo improvizas sian arton, sian religian spiriton, siajn sociajn kaj edukajn konceptojn, sian pasion por diciplino aŭ libero, aŭ eĉ sian sintenon al la milito aŭ la morto.

Ĉiuj laboras sur antikvaj temoj, kaj progresas, se eble, laŭ la modoj de pensado kaj agado, kiuj truditaj al ĉiu familio kaj ĉiu lernejo, en la vendoplaco kaj la ludejo, en la kampo kaj la fabriko, en la kutimoj kaj la lingvo.

Kaj ĉar estas la privilegio de artaĵoj esprimi ĉi tiujn interesojn, ĉi tiujn konceptojn, ĉi tiujn manierojn de estado — kaj ilin esprimi tiel bone, ke la artaĵo ŝajne donas al ili moralan bazon — kulturaj valoroj estas tradukeblaj kaj transdoneblaj.

„Oriento kaj Okcidento” paĝo 32.

Priskribi la historion de la infanaĝo kiel tiun de la maturaĝo estas falsigo. La tute vekiĝinta povas nur perforte rakonti sonĝon, kiel li vere travivis ĝin.

Alte super la kapo de la infano pasas la fluo de la grandaj okazaĵoj. Nur gute kaj ne kontinue ĝi ricevas percepton pri ĝiaj kirloj. Ĝuste tiu nekapablo vidi la interligon igas la realon sonĝeca.

En la longa sonĝo de la infanaĝo regas arbitra, neesplorable kaj tropotenca sorto, malŝparema kiel la feino kun la sorĉvergo ĉe la lulilo de la princino aŭ kruela kiel la lupulo en la fabelo pri Ruĝĉapulinjo.

La ombro de tiu sorto falas ankaŭ sur la jarojn de la maturaĝo. Ĝia fantombildo persekutas nin eĉ tiam kiam ni komencas konscie direkti la okazaĵojn de nia vivo. Nur malmultaj elektitoj de la libero vere akordigas kun siaj feinoj kaj monstroj.

Sveda Antologio” paĝo 364/365.

S 2

Ter vertaling.

Tijd: van 10- 12 uur.

De veelheid van de bestaande talen.

De kunsttalen, die in dit werk behandeld zullen worden, danken hun ontstaan aan het besef, dat de veelheid en de verscheidenheid der bestaande talen een ernstige belemmering vormen voor het aanknopen en in stand houden van internationale betrekkingen. Wil men zich een juist inzicht vormen over het bestaansrecht en

de mogelijkheden van een kunsttaal, dan dient men enig inzicht te hebben in de bestaande taalverhoudingen. We zullen dus op de eerste plaats trachten een idee te geven van de veelheid der thans gesproken talen. Hierbij gaat onze belangstelling vooral uit naar Europa en de gebieden met een overheersend Eropese beschaving. De bewoners van de overige gebieden immers nemen in veel mindere mate deel aan het hedendaagse internationale verkeer. Toch zou het onjuist zijn, ze daarom geheel buiten beschouwing te laten. Door kolonisatie, handelsbetrekkingen, missionering en anderszins komen ook de meest afgelegen volkeren geleidelijk binnen de invloedssfeer van de Westerse beschaving. De vooruitgang van de techniek maakt dat vele gebieden die korte tijd geleden nog ontoegankelijk waren, thans gemakkelijk te bereiken zijn. Het is dus denkbaar, dat het wereldverkeer zich reeds in de naaste toekomst gaat uitstrekken tot volkeren, die tot heden geheel afzijdig gebleven zijn.

Het is bij de tegenwoordige stand van de taalgemeenschap nog niet mogelijk, een volkomen betrouwbaar idee te geven van het aantal der talen, die op de aarde gesproken worden. Nog steeds zijn niet alle talen onderzocht of zelfs maar geregistreerd. Toch kunnen we met behulp van de op dit gebied bestaande literatuur het aantal van de thans gesproken talen bij benadering vaststellen.

Uit: Vijf kunsttalen
Dr. W. J. A. Manders.

René Descartes kaj la Universala Lingvo

(daŭrigo el la februara numero)

Descartes pensis, ke

„oni devus starigi metodan sistemon por ĉiuj pensoj — ideoj, simile al la metode starigita ordo por la natura vico de la nombroj. Samkiel oni povas en unu tago lerni en iu nekonata lingvo nomi kaj skribi ĉiujn nombrojn ĝis senfineco, la nombrojn, kiuj ĉiuokaze estas senfina vico de vortkombinoj, samtiel devus esti eltrovita la ebleco konstrui ĉiujn vortojn, necesajn por esprimi ĉion, kio venas kaj povas veni en la homan cerbon. La eltrovo de tiu lingvo dependas de la vera filozofio. Nur ĝi povus nombri ĉiujn pensojn-ideojn de la homoj kaj klasifiki ilin per sistema ordo, samtempe farante ilin klaraj kaj simplaj. Ĉio dependas de la eltrovo de tiuj simplaj ideoj; kiuj estas propraj al la percepto de ĉiu homo kaj el kiuj sin kombinas ĉio, kion la homoj pensas...”

Drezen: Historio de la Mondolingvo

Ĉu vi jam studas pere de la Instrua Servo de FLE? Multaj ne FLE-anoj lernas ĉe ni kun sukceso. Petu informojn.

Lernu ludante, ludu lernante

J. W. Minke

Bedaŭrinda nia rubriko ne aperis en la maja numero. Kdo Weiberle demandis, iom maltrankviligite, ĉu ne estas plu kompilintoj? Oh ne, ili ne mankas al mi. „Aŭ, ĉu vi haltis pro la proksima somera sezono?” Ne, ankaŭ tio ne estas la kaŭzo, ĉar laŭ kongresdecido, L.E. ne aperos en aŭgusto, por ke la redakcio povu iom ripozi per malstreĉiga ferio. Mi do petas al vi rigardu la monaton de majo kiel ekstran ferion por la redakcio de Lingva Rubriko kaj ĝoju kun ni, ke la vetero helpis por gaje pasigi ĝin.

De la aprila enigmo („Sablo-horloĝo”) mi ricevis solvojn de: S. Aarse; J. H. Breedenoord; L. Bruijn-Bas; N. J. v. Dijk; J. R. v. Eynde; H. Hooghuis; G. Jong — Durgerdam (bonvenon!); H. Keuter; Mia Maatman; Syfke Musch; H. Oudenhooven-Bishoff; A. Reiné; G. J. Rodenhuis-Boll; F. Smit; P. J. van Tol; E. Weiberle kaj de R. Vos-Uil el IJmuiden, al kiu mi sendis la ĝojigan komunikon pri ŝia sukceso jam la 16an de majo. Mi kore gratulas ŝin, ĉar ŝi apartenas al la fidelulinoj el la „bona malnova tempo” kiam ni komencis tiun ĉi rubrikon.

Mi iom miris pri tio, ke ne ĉiuj solvintoj bone komprenis la celon de la sablo-horloĝa-enigmo. Estas tamen klare, ke vi faru la 2an vorton al la unua, la trian el la dua k.t.p. forlasanta unu literon, kaj ke vi kompilu la 8an vorton el la 7a, la 9an el la 8a k.t.p. aldonanta unu literon. Sed inter la solvintoj estas iu, kiu faris el „kaprino” la vorton „ironio” (devas esti rikano), el la vorto „morale” la vorton „glorigo” (devas esti reklamo). La vorto „rikano” certe ne estas ĉiutaga vorto, sed oni nepre preteratentas la celon de la enigmo, se oni faras el la vorto „kaprino” la vortojn „satiro” aŭ „ĉikano” aŭ se oni kompilas el „morale” la vortojn „deklaro” aŭ „informo”. La ĝusta solvo estas: kaprino — rikano — krano — kora — ora — ar — a — la — mal — mola — larmo — morale — reklamo.

La novan enigmon mi dankas al kdo N. van Dijk el Bunnik. Ĝi konsistas el 17 sepliteraj vortoj, kies priskribo sekvas ĉi sube. La enigmo apartenas al la „klasika” tipo, tamen ĝi estas tre interesa, ĉar — se vi bone solvas ĝin kaj trovas la ĝustajn vortojn, la unua kaj la kvina literoj formas proverbon. Bonvolu menciigi ĉe via solvo, kiu estas laŭ via opinio la nederlanda ekvivalento.

Priskribo: 1. fluidaĵo por purigi; 2. veraĵo evidenta per si mem; 3. tabela kalkulo laŭ aktivoj kaj pasivoj de la financa stato; 4. strangforma bela floro; 5. la pli mallonga osto de la antaŭbrako; 6. kliniganta for de la vertikala direkto; 7. posta parto de la piedo; 8. fibreca mineralo nebruligebla; 9. unu el la 12 monatoj; 10. insekto havanta kvar flugilojn; 11. konsenti ricevi ion; 12. kirloventego; 13. ornami tekston per bildoj; 14. militista surŝultra ornamaĵo; 15. iu, kiu sin movas en akvo; 16. ordo de mamuloj al kiu apartenas la baleno; 17. homo, kiu kutimas publike paroli. Bonvolu sendi vian solvon al J. W. Minke, Veeteeltstraat 144, Amsterdam plej laste 21.8.66. Mi deziras al vi sukceson!

Recenzoj

Emilo Gasse, „Raciaj derivaĵoj kaj verbuzaĵoj”, necesega aldonaĵo al ĉiuj nunaj vortaroj kaj lernolibroj. Eldono de la aŭtoro. Depone ĉe „Heroldo de Esperanto”. Formato 21.5 X 13.5 cm, 8 paĝa. Prezo neindikita.

La dioj kompatu senkulpan kursanon, kiu trovis tiun ĉi „necesega aldonaĵo”. Sperta esperantisto nepre devas studegi la broŝuron kaj post tio tamen ne komprenos ĝin. Ĉu efektive necesega disertacio pri verbaj finaĵoj en kelkaj naciaj lingvoj? Ĉu neeviteble prezenti tutan aron da nocioj kiaj SU (substantive ula), SI (substantive ilara), ST (ceteraj transagaj substantivoj) ktp?

Se kursano sukcesus pene pumpi en sian kranion tiun ĉi plenan kolekton, li eble povus papage ripeti ĝin, sed iom da utilo tio ne liverus al li.

Oni ne povas ne havi la ideon, ke la aŭtoro ŝatas la principon de sufiĉo kaj neceso. Sed kion pensi pri tiel same kiel kaj kiel kontrasto praarbo (-arbaro)? Nepre stranga estas la konstruo de pluraj frazoj, ekzemple: „tio dume Esperanto per malmultaj sed certaj deriviloj, trafas pli da riĉo kaj da precizo. Kaj ĉi tiun: Ne konsideri en Esperanto la nacian, des- plimalprave la internacian gramatikan karakteron de radiko, tio kaŭzus konfuzon kaj fuŝas la profiton donitan de nacia aŭ internacia uzo.

Se la enhavo de ĉi tiu broŝuro estus aldonita al niaj lernolibroj, ĝi efikus kiel timigilo kaj tion nepre ne povas al si permesi la Esperanto-movado.

Spertaj samideanoj profundigu en la kavernojn de la gramatiko, sed prefere ĉe tio ili prenu kiel gvidilon verkojn renomajn kaj tiurilate ni ne povas ne pensi pri Plena Gramatiko de Kalocsay kaj Waringhien kaj Lingvo, Stilo, Formo de Kalocsay.

J. Ph. Punt.

Dicionário Português — Esperanto, kompilita de Ismael Gomes Braga, eldono de Cooperativa Cultural dos Esperantistas en Brazilio. Kovrila desegnaĵo de Amarílio Carvalho.

Estas por nederlandano iom malfacile recenzi verkon tian. Pro kio ni do tamen turnas atenton al ĝi? Nu, unualoke por atentigi vin pri la kooperativa eldono de niaj samideanoj en Brazilio. Due, ĉar ne nur la unua kovrilpaĝo estu menciita, sed ankaŭ la lasta. Sur ĝi ja estas listo pri 21 edukejoj, kie Esperanto estas instruata. Tiom ni almenaŭ komprenas el la portugala! Krome ankaŭ la foliumado estis interesa okupo. Ni legis kiel tradukon de la vorto *Abacate* (advokato), la vorton *avokato*. Ĉu tio estas kompostararo, ni ne scias kaj ĉu ekzistas ankaŭ *avinokato* estas al ni same nekonate. Cetere *dieta* estas *dieta*, sed ankaŭ (*provinca*) *delegitaro*.

Kiu plendis, ke Esperanto ne estas sufiĉe elvokiva? Al li mi ne povas ne demandi, ĉu la portugala ne estas konfuze elvokiva. En *pronto* — *rapid(far)a, tuja*, la nederlandanoj eĉ povas rekoni sian propran *prompt*.

Ne, recenzi — laŭ la kutima senco de tiu vorto — ĉi tiun vortaron ne estas eble, sed volonte ni gratulas la samideanojn en Brazilio pro la eldono.

P.

„Por la Paco”, Moskvo 1966. Organo de „Unio de Sovetaj Societoj de Amikeco kaj Kulturaj Ligoj kun Eksteraj Landoj. Eldono de „Komisiono pri Internaciaj Ligoj de Sovetaj Esperantistoj”.

Ankaŭ la ĉi-jara kajero de supre-indikita revuo estas riĉenhava kaj nepre le- ginda.

La enkonduka artikolo estas pruvo, ke teknikaj raportoj ne estas problemoj por la lingvo internacia. Kortuŝa estas „La ŝoseo”, epizodo el la barbara regado de la naziaj hordoj. Ni ne forgesu tamen, ke ekzistis (-as?) ankaŭ rusaj koncentroj kaj ke la „korektejoj”, kien sendis la stalinismo siajn kontraŭ-ulojn ne estis libertempaj pensionoj.

Tokio diris: Pacon!.. jen vere mirinda kontribuajo. Kun granda interesiĝo ni legis tiun raporton pri la 50-a Universala Kongreso. Kun brila kontento ni notis, ke fakte la tuta kongreso estis seninterrompa protesto kontraŭ la usonaj agresantoj!

Ankaŭ la germanaj revenĝemuloj ne forgesiĝis. Tion oni kun trankvila animo lasu al MEM (Mondpaca Esp. Movado). Por plene elrevigi la naivulojn kiuj daŭre kredas pri la neŭtrala Esperantomovado, servu jena citaĵo:

„Spirito de la paco kaj amikeco interpopola, kiu regis dum la kongres-tagoj, ne estis aliigita, malgraŭ penoj de malmultnombra grupo de kongresanoj, precipe usonanoj, kiuj eksentis sin ofenditaj pro la kondamno de la usona agreso en Vjetnamio. Solidariĝante kun la agresantoj kaj penante ŝirmi sin per „principo de neŭtraleco”, tiuj apartaj personoj penis ŝtopi la buŝojn de ĉiuj pacamikoj, akre protestantaj kontraŭ krimoj de usonaj generaloj kaj politikistoj en Azio. Tamen malgraŭ vanaj penoj de la pseŭdo-neŭtraluloj, la kongreso entute estis impona kaj granda demonstracio por la paco, interpopola amikeco, kontraŭ milito kaj agreso.” Se ion tian ni estus skribintaj en „Sennaciulo”!!

Vastan atenton ĝuas en ĉi tiu kajero la poezio. „En la mond’ gejunuloj” de Debora Vaarandi, estas tradukita el la estona de Hilda Drezen, ja ne la unua renkontito. Nia opinio la traduko nepre ne estas propagando por Esperanto kiel poezia lingvo. La tuto estas plektaĵo el elizioj, pro kio ĝi pensigas pri anhelanta astmulo. Intervjuo kun 160-jara Ŝirali-baba trudis al ni la demandon, ĉu estas necese fariĝi tiom aĝa por diri: „La milito estas granda plago. La homoj devas vivi en paco kaj amikeco”. Indignas la redakcio pro bruligo de libroj neplaĉaj al junaj kristanoj en Düsseldorf. Prave, sed la rusaj samidanoj memoru pri la sorto de iuj rusaj verkistoj, kies ideoj ne plaĉas al la potenculoj en Kremlo!

Por konatiĝi aŭ renovigi la kontakton kun la rusa Esperanto-movado, ni rekomendas al vi legi la libreton. Estas instrue, precipe pri stilo kaj lingvo-uzo de slavaj esperantistoj.

Rob kwantes, ankoraŭ troviĝanta en la sanatorio „Zonnegloren” en Soest, tutkore dankas ĉiujn pro la regule senditaj salutoj kaj bondeziroj. Li deziras al ĉiuj agrablajn feriojn!

Ismael Gomes Braga, „Veterano?” Respondoj al la demandaro por la „Festo de la veteranoj”, aranĝita de la Jubilea Kongreso de Esperanto en aŭgusto 1937 kaj Originalaj Artikoloj. Dua eldono. Reviziita kaj pligrandigita. Eldonis: Kultura Kooperativo de Esperantistoj, Rio de Janeiro, Brazilio.

Prezo neindikita. Formato 19 x 14 c.m. 231 paĝoj.

Jen libro kiun ni legis kun granda plezuro. La lingvaĵo estas modela, la tuto legiĝas agrable kaj estas nova konfirmo pri tio, ke Esperanto estas lingvo ĉiurilate taŭga kaj vivanta. La plej bona pruvo estas la citaĵoj el poezio de Zamenhof (9 x) kaj Dombrovski (1 x) super la respondoj al la dek demandoj prezentitaj al la veteranoj. Nur el lingvo vivanta oni povas ĉerpi tiom abunde. Kondiĉe tamen, ke la aŭtoro regu tiun lingvon, sed koncerne tion I.G.B. estas la ĝusta homo!

Samtempe tiu ĉi (re)konatiĝo kun la poezio de Zamenhof estas vera ĝojo. Ja ĝi instigas al lego aŭ relego de la poemoj cititaj. Simpla kaj ofte kortuŝa estas la poezio de la Majstro. Jes, konsentite, la stilo estas „eksmoda”, sed la homo kiu manipulis ĝin ne dronigis la strofojn en torento da elizioj, tiu plago de la moderna poezio.

En la fino de la tria respondo oni ne povas ne demandi al si, kiom da homoj ankoraŭ ne estas esperantisto en Brazilio. Aliflanke tamen la konfeso, ke la du leteroj de P. Nylen presitaj sur la refaldoj estas prava laŭdo al la aŭtoro de la libro. Ja legante la modelan lingvon, oni plene forgesas, ke estas tiu, kiun titolis iu ulo Blinkenberg barbaraĵo! Pri la respondo al la deka demando. Post ekspliko de tio kio okazis en Japanio, la aŭtoro diras, ke en provincaj urbetoj la kleraj loĝantoj ofte vizitas librejon kaj poste li opinias, ke eldono de propaganda materialo kaj lernolibroj en la du grandaj kultur-lingvoj — la franca kaj la angla — estus grava paŝo. Ja tiujn du lingvojn legus pli-malpli bone ĉiuj instruitaj homoj. Li aldone diras, ke eble francoj kaj angloj ne komprenos lin kaj mokos lian naivecon, ĉar ili ne scias, ke ili estas uzataj kiel kribribo por ni; nur post plena triumfo de libro en la francaj librejoj la alilandaj librovendistoj kuragras mendi ĝin. Nu, ni ne mokos lin, sed naiva nia opinio li estas. Ni ne forgesu tamen, ke tiuj frazoj estas skribitaj antaŭ preskaŭ 30 jaroj kaj intertempe la mondo (la homaro) iom ŝanĝiĝis. Se gravaj societoj en Londono kaj Parizo eldonus bonan materialon en la franca-kaj la angla lingvoj... ktp., certe la movado revigliĝus. Jesja! Tio ĉi ege egalas al la kalkulado de Zamenhof pri tiom da milionoj da amikoj en tiom da monatoj. Kun li ni tamen opinias, ke ĉiuj ĝis nun faritaj klopodoj estis bonaj kaj estu daŭrigataj.

P.

La libro nur etaparte konsistas el respondoj al la dek demandoj. La cetero estas kolekto da alispecaj kontribuajoj de la aŭtoro. Alispecaj, sed same interesaj. Eĉ nia propra Lanti estas sur la scenejo per „Manifesto de la sennaciistoj”. Kiel „burĝa” esperantisto la aŭtoro ne deziras diskuti pri pravo aŭ malpravo de nia barbohava herezulo, kiu diris, ke por la sennaciistoj Esperanto estas la ĉefa lingvo kaj la naciaj — nur helpaj. Sed

per la artikolo „Laborante por Esperanto samtempe oni servas sian patrolandon”, li ja diras, ke nur per Esperanto la brazila literaturo povis disvastiĝi tra la mondo, sed neniel per la portugala. Kaj ĉu per tio li, do, ne konfesas, ke tamen tiu herezulo pravus? Kaj cetere: Lanti havis kiel solan vivcelon la sen-naciismon, dum la aŭtoro siaflanke atingis kiel maksimumon la internaciismon. Kaj „servi la patrolandon” estas prenita rekte el la frazeologia arsenalo de la naciistoj. Jen, per tri vortoj, „La Vojo Returne”.

Pri la libro kiel tuto ni povas tutkore diri, ke ĝi estas altgrade leginda kaj posedinda. Ni esperas, ke ĝi trovos lokon en la bibliotek(et)o de multaj samideanoj. P.

★

Ankaŭ ĉi-foje *La Juna Penso* estas interresa.

Viglaĵoj diskutadoj inter la legantoj, publikigitaj en la organo, montras ke SAT-Junulfako vivas kaj ke ĝia membraro konsistas el ĝejnuloj de tiu-ĉi tempo, kiuj havas siajn opiniojn pri multaj gravaj mondproblemoj.

Cetere la organo estas ankaŭ bona legaĵo por personoj ne plu estantaj inter dudek- kaj tridekjaraĝoj.

Se vi interesigas: sendu f 3,— al la poŝtĝirnumero 50 88 29, nome de k-dino Mia Maatman-v.d. Starre en IJmuiden, kaj dum tuta jaro vi ricevos LJP-n.

★

Aperis la plej lasta lernolibro de Esperanto por angla-lingvanoj:

ESPERANTO: A NEW APPROACH de William Auld, M.A., D.B.E.A. membro de la Akademio de Esperanto. Ĉefinstruisto de angla lingvo en la Grangelnernejo (Alloa, Skotlando).

Formato: 13 × 18,70 cm; 92 paĝoj; 14 lecionoj, 46 ekzercoj (kun ŝlosilo por memlernantoj) literaturaj legaĵoj el la plumo de la plej famaj Esperanto-verkistoj, vortareto Esperanto-angla. Prezo: 1,20 \$ (8/7 ŝil.)

Ĉiu ekzemplero entenas kuponon en valoro de \$ 0,30, validan por aĉeto je rabatita prezo „Fabeloj” de H. C. Andersen (tr. de D-ro Zamenhof), vol. IV.

W. Auld instruas Esperanton laŭ nova didaktika metodo, nome laŭ la celoj de la internacia lingvo mem kaj ne laŭ la strukturo de la angla lingvo.

Eldonis: Heroldo de Esperanto, Bruselo.

★

Restaĵoj de la Eŭropa Esperanto Konferenco 1965 nun estas haveblaj je reduktitaj prezoj:

	int. rpk.
1 Distra koktelo, 128 paĝoj	5
1 Vienaj legendoj, 48 paĝoj	2
1 Plasta portujo	
kun surskribo: Esperanto	1
8 poŝtkartoj, plurkoloraj	1
100 paperaj buŝtukoj	
kun E-surskribo	5
1 surprizpakajo	8

+ afranko

Mendante varojn bonvolu kunsendi int. resp. kuponojn aŭ pagu per int. poŝtmandato al: Aŭstria Esperantista Federacio, A-1150 Wien, Fünfhausgasse 16.

El la sekcioj ★ Semajnfino

Faulhaber-fondaĵo

APELDOORN

G. P. Durlinglaan 31 (Ugchelen)

Pro diversaj kialoj k-do Bredenoord-filo ekzistis kiel kasisto. Ni volas danki lin (kaj lian filinon) pro la multjara prizorgo de niaj financoj. Anstataŭas lin k-do A. Von-deling.

Niaj konversaciaj vesperoj provizore ne okazos. Komence de septembro ni denove kunvenos.

A. Lakemond, sekretario.

UTRECHT

En la sekcio Utrecht ekzistis kiel prezidanto k-do Punt. K-do Punt fariĝis sekretario de FEN kaj pro tio deziris transdoni la prezidantan funkcion en la sekcio.

Li trankvile forlasis la postenon, sciante ke ĉe k-do Levering, kiu pretis transpreni la taskon, la funkcio estas en bonaj manoj. La adreso de la nova prezidanto estas: k-do Th. Levering, Bossebroekstraat 4, Utrecht (noord).

G. C. de Greef, sekretario.

Ni funebras kaj kondalencas

Forpasis k-do E. Willekens...

Denove la FLE- kaj SAT-anaro funebras pro la forpaso de unu el siaj pioniroj. Naskiĝinte en 1889, k-do Willekens unue aliĝinte al Belga Ligo estis en 1921 kunfondinto en Antverpeno, de la unua Socialista Esperanto grupo „Nia Ideo”, kiu en 1929 aliĝis al la Federacio de Laboristaj Esperantistoj en la regiono de la nederlanda lingvo. Dum multaj jaroj prezidanto de distrikto Flandrio de tiu LEA kaj de la FLE-grupo en Antverpeno, li ankaŭ gvidis la Esperanto-kurson ĉe la Popolaltlernejo Em. Vandervelde en tiu urbo. Kiuj konis lin, la esperantiston de post pli ol 50 jaroj kaj fidelan SAT-anon, memoros pri li kiel pri samideano kiu ĉiam instigis al perfektigo de la lingva nivelo de la esperantista laboristaro; strebante al tio ni plej bone povos honori lin, kiu forlasis nin la 13-an de majo.

Stella de Weerd

★

Sabaton la 28an de majo mortis nia honora membro, k-do P. Kleineveld en la aĝo de 80 jaroj.

Li estis unu el la fondintoj de sekcio Delft kaj multon faris por nia movado.

Dum la lasta tempo li kuŝis en mal-sanulejo kaj ne plu aktive partoprenis en la sekcio dum pluraj jaroj.

Por la estraro de sekcio Delft,

La sekretario-kasisto
G. Pasman

Faulhaber-fondaĵo

La Asocia kasisto ricevis por la Faulhaber-fondaĵo jenajn donacojn:

de gek-doj Henstra, Arnhem f 5,—, de k-do W. Meere, Scheveningen f 1,— kaj de k-do W. v. Bodengraven, Haarlem f 2,50.

Ni kore dankas la donacintojn!

Denove la Faulhaber-fondaĵo organizos semajnfinojn en la junulargastejo „De Grasheuveel” en Amersfoort je 15/16 de oktobro. La prezo estos f 8,50 por tranoktado, du panmanĝoj kaj unu varma manĝo.

Litotukojn oni devas kunporti aŭ ĉi kontraŭ f 1,—.

Vojaĝkostojn super f 5,— repagos la Faulhaber-fondaĵo al membroj de FLE.

Provizora programo:

Sabaton:

k-dino A. C. Obbes enkondukos la temon „Grupvesperoj”.

Dimanĉon matene:

k-do N. Bartelmes el Parizo, redaktoro de „Sennaciulo”, enkondukos la temon „Geografiaj nomoj en Esperanto”.

Dimanĉon posttagmeze:

k-do Faulhaber prelegos pri „La Akademio de Esperanto, ĝiaj estiĝo, celo, funkciado kaj decidoj”.

Post ĉiu temo estos okazo por diskutado.

Pli da informoj en la sekvonta numero de L.E. Jam nun notu la datojn!

Sciigu vian aliĝon al la Asocia kasisto per samtempa pago de f 8,50 al la poŝtĝirnumero 33 11 33, nome de la kasisto de Bond van Arbeiders-Esperantisten, FLE, Amsterdam.

„De Grasheuveel” estas bonega kunvenejo en bela regiono!

Jo Schouten,
sekretariino.

Examen LO-akte Esperanto 1966

Aangemeld 7 kandidaten

Afgewezen na het schriftelijk gedeelte: 3
Deelgenomen aan mondeling gedeelte: 4
Afgewezen na mondeling gedeelte: 1
Geslaagd: 3

De geslaagden zijn:

mevr. E. Kervers-van Tholen en de heren H. Appelo en P. J. van Tol.

Grava!

Kiel anoncite en la antaŭa numero de LE, la septembra eldono (samtempe Esperanto Wint Veld) aperos ĉirkaŭ la 8a de la monato.

Pro tio ni faras escepton pri la limdato por kontribuoj: ili estu ĉe la Asocia sekretario plej laste la 18an de aŭgusto.

Kontribuoj (en la nederlanda lingvo), ĉu en formo de artikolo, ĉu de sloganoj, estas kore bonvenaj. Ĉiuj ili estos juĝataj pri la taŭgeco ilin publikigi en **Esperanto Wint Veld, via propagandilo por la Verda Monato!**

Ankaŭ ĉijare VARA invitis nin fari prelegon por la radio.

Ĝin faros k-dino Bakker-ten Hagen, sub la titolo „Ontmoetingen met Esperanto.” La elsendo okazos la 27an de aŭgusto de 14.55-15.10 horo.

